

# Fenikso

Revuo de Esperanto Nederland

27-a jarkolekto • n-ro 3 | majo - junio 2022

Gezellig en leerzaam  
studieweekend in Krikkenhaar



Paco inter homoj  
kaj nacioj

8

11


Vivo kiel denaskulo

12

Kultura tago in juni

27

Uitnodiging voor het  
Benelux-congres



15

Kandidatoj por la  
estraro



## Fenikso, Forumo de Esperanto Nederland

Dumonata membrogazeto de Esperanto Nederland  
ISSN 1384-6515

Membroj de Esperanto Nederland ricevas la gazeton.  
La jara kotizo estas € 35,-  
(por samdomanoj €12,50).  
NEJ-anoj pagas € 15,-  
(por samdomanoj € 5,-).

Vidhandikapitoj povas ricevi kasedan version, aranĝitan de Rob Moerbeek. Petu abonon ĉe:  
[Redakcio@esperanto-nederland.nl](mailto:Redakcio@esperanto-nederland.nl).

### Kunlaborantoj de Fenikso:

Ĉefredaktoro: Foppe-Klaas Hovinga  
Redaktoro: Andries Hovinga  
Korektantoj: Marc Konijnenberg kaj Bert de Wit  
Konsilanto: Ineke Emmelkamp  
[Redakcio@esperanto-nederland.nl](mailto:Redakcio@esperanto-nederland.nl)

### Limdato:

Materialo por la sekva numero estas bonvena ĝis la  
1-a de junio 2022.

### Informoj pri Esperanto:

Ineke Emmelkamp  
Arubastraat 12, 9715 RW Groningen  
[info@esperanto-nederland.nl](mailto:info@esperanto-nederland.nl)  
tel. 050-5718842

### Studsemajnfino/studieweekend:

[studosemajnfino@esperanto-nederland.nl](mailto:studosemajnfino@esperanto-nederland.nl).

### Esperanto Nederland enrete:

Retejo: <https://www.esperanto-nederland.nl>  
Fejsbuko: [facebook.com/esperanto.nederland](https://facebook.com/esperanto.nederland)  
Telegramo: <https://t.me/EsperantoNederland>  
Tvitero: <https://twitter.com/EsperantoNL>

### Sendu viajn respondojn al:

[redakcio@esperanto-nederland.nl](mailto:redakcio@esperanto-nederland.nl)  
Respondu al artikoloj per maksimume 200 vortoj.  
La redakcio decidas ĉu publikigi tekstojn aŭ ne.

## Estraro

- **Estraro:** [estraro@esperanto-nederland.nl](mailto:estraro@esperanto-nederland.nl)

- **Prezidanto:** vakas,  
([prezidanto@esperanto-nederland.nl](mailto:prezidanto@esperanto-nederland.nl))

- **Sekretario:** Ineke Emmelkamp,  
Arubastraat 12, 9715 RW, Groningen  
([sekretario@esperanto-nederland.nl](mailto:sekretario@esperanto-nederland.nl))

- **Kasisto:** Loes Demmendaal,  
Duikerlaan 160, 2903 AC,  
Capelle a/d IJssel.  
([kasisto@esperanto-nederland.nl](mailto:kasisto@esperanto-nederland.nl))  
tel.010 2133320

- **Estrarano:** Andries Hovinga,  
De Fennen 47, 8918 CC,  
Leeuwarden, tel.06 28916262  
([andries.hovinga@esperanto-nederland.nl](mailto:andries.hovinga@esperanto-nederland.nl))

Nieuwe bestuursleden zijn welkom.  
Novaj estraranoj estas bonvenaj.

- **Pri sociaj komunikiloj:**  
([sociaj-komunikiloj@esperanto-nederland.nl](mailto:sociaj-komunikiloj@esperanto-nederland.nl))

### - Membro-administranto:

Koos Scharroo,  
Vaartweg 24G, 8382 EB, Frederiksoord  
([membroj@esperanto-nederland.nl](mailto:membroj@esperanto-nederland.nl))  
tel.06 22413267

Bv. informi pri (ŝanĝoj de) poŝtadreso,  
telefonnumero, retroŝtadreso, (eks- kaj  
ali)membriĝo, pagmaniero

### Bankkonto:

IBAN: NL 10 TRIO 0786 8441 67  
nome de Esperanto Nederland,  
Capelle aan den IJssel.

### Eventuala resendadreso/eventueel retouradres:

Esperanto Nederland Ledenadministratie  
Vaartweg 24G  
8382 EB Frederiksoord



## En tiu ĉi numero

4. De la estraro
  5. Bonvenon
  6. Mallongaĵoj
  7. Letero, Lingva testeto
  8. Paco inter homoj kaj nacioj; Fukuŝima
  9. BET-56
  10. Adiaŭ, Nieuwe Binnenweg
  11. Prelego: "Vivo kiel denaskulo"
  12. Studsemajnfino marto 2022
  15. Kandidatoj prezentas sin: Peter van Noorden kaj Marc van Oostendorp
  16. Financaj dokumentoj por la jarkunveno
  20. Libro: malnovaj libroj, La malamiko de Putin
  21. Nekrologoj: Dineke Paetzel-Veenstra, Bessie (C.W.E.) Schadee kaj Klaus Leith
  22. Vortserĉenigmo
  23. Revuo-interŝanĝo
- Eventoj:**
24. Kultura Tago
  26. BENELUX-congres
  28. Komend Esperanto Studieweekend; 78-a IJK

## Amsterdama Rondo

"La Amsterdama Rondo" organizas kunvenojn de esperantistoj - ĉiun duan dimanĉon de la monato. Ni renkontiĝas, ĉu fizike, ĉu per ZOOM. Ĉiuj estas bonvenaj.

Organizanto:

[laamsterdamarondo@gmail.com](mailto:laamsterdamarondo@gmail.com)

+31 614 240 870 (Peter)

+31 23 5242 643 (Bert)

Vidu: <http://amsterdamo.nl>

## Voorwoord

De lente is begonnen. In het Parool kwam al op 28 februari een nog vormeloze Esperanto-tulp de grond uit. Wat het zou worden was nog niet goed zichtbaar. Zou ze opnieuw zo mooi bloeien als de vorige keer? De Esperanto-tulp, zagen we in eerdere nummers van Fenikso al, laat zich niet bombastisch zien, maar waar ze staat, daar staat ze. Eigenlijk net zo als de bloemen van Leston Buell.

Leston zal ons, na afloop van de jaarvergadering, introduceren in de kunst van het tekenen. Steeds als ik de pagina's van dit nieuwe nummer door kijk, blijven mijn ogen even bij zijn bloemen hangen. Ze zijn vrolijk en door de zwarte inkt die is gebruikt, lijkt het of ze willen zeggen: "Hier zijn we, ons krijg je niet zomaar weg. We zullen bloeien."

UEA gaat haar hoofdkantoor in Rotterdam verpotten, maar gelukkig anders dan ik dacht, naar een plek in dezelfde straat. Ze wil meer met Esperanto Nederland samen werken, las ik ook. Wel gaat er met het sluiten van het huidige kantoor een stuk geschiedenis weg. Marc van Oostendorp schreef daarover.

Veel teksten in dit nummer zijn geschreven door leden. Enkele cursisten vertellen over het studieweekend in maart. Na twee jaar kon dit gelukkig weer doorgaan. De zon was er ook bij, dus na weken van kou konden we zowaar buiten les krijgen. Marc van Oostendorp en Peter van Noorden stellen zichzelf voor als kandidaten bestuurslid.

Bij de overlijdensberichten beperken we ons niet tot de leden. Ook noemen we de namen van hen die zich enige tijd geleden of recent voor het Esperanto hebben ingezet. Het overlijden van Klaus Leith trof ons onverwacht. Er waren afgelopen jaar veel mailberichten van hem langsgesproken over Esperanto en de EU en nog in januari was hij aanwezig bij de Amsterdama Rondo.

Twee interessante uitnodigingen: de culturele dag (Kultura Tago) op 25 juni in Woudrichem (Noord-Brabant) en een Benelux-congres van 23 tot 25 september in Ieper (België). Tot slot ook aandacht voor de oorlog in Oekraïne. Onze gedachten zijn bij de slachtoffers en we hopen dat de vrede snel komt.

We wensen je veel leesplezier.

*Foppe-Klaas Hovinga,*  
*Hoofredacteur*

## Foto sur la kovrilo

Unuafoje ekde Novembro 2019 denove estis studsemajnfino, organizita de Esperanto Nederland. Preskaŭ 30 homoj lernis Esperanton. Ili estis instruitaj de kvin instruistoj el Nederlando kaj Belgio: Bert de Wit, Piet Glorieux, Françoise Pellegrin, Lode Van de Velde kaj Roel Haveman. Tiel komencantoj kaj spertuloj fariĝis pli scipovaj pri la lingvo. Gvidantoj estis Arjen-Sjoerd de Vries, Lilian van der Burgt kaj Ineke Emmelkamp. Smaranda Tintu kaj Marjan Franssen helpis en la kuirejo. En ĉi tiu numero de Fenikso kvin lernantoj rakontas pri siaj spertoj dum la bela printempa semajnfino.

*Foto de Ineke Emmelkamp.*



## De la estraro



Kia diferenco! Nun, kiam mi verkas ĉi tiun artikolon, la neĝo falas kaj la plantoj estas kovritaj per bela blanka tavolo. Antaŭ kelkaj tagoj ni estis en la ejo Krikkenhaar por ĉeesti la studosemajnfinojn. Tiam la suno brilis.

La studogrupoj okazis ekstere en la bela arbara regiono de Krikkenhaar! Ni kaftrinkis ekstere. Ni tranĉis la legomojn ekstere! Dum du jaroj ne okazis la studosemajnfinoj kaj nun la vetero estis tiom agrabla. Ni, la organizantoj kaj partoprenantoj, estis tre kontentaj. Espereble ni revidos multajn partoprenantojn en la nova studosemajnfino, kiu okazos la 14-an, 15-an kaj 16-an de Oktobro! Notu tiujn datojn!

### Kultura tago

Tri aktivaj membroj, Korine Cheizoo, Jorine Captein kaj Smaranda Tintu, organizas kultureman tagon, kiu okazos la 25-an de Junio en la ĉarma vilaĝo Woudrichem. Informojn vi trovos aliloke en tiu ĉi Fenikso. Ni esperu ke tiam estos sunplena tago!

### Jarkunveno

La jarkunveno de Esperanto Nederland okazos la 21-an de Majo, en la 'Partycentrum Floor' en Lunteren. La tagordon kaj aliajn necesajn dokumentojn vi povis legi en Fenikso 2/2022. En tiu ĉi numero vi trovas kelkajn aldonajn financajn dokumentojn. Kunportu Fenikson n-rojn 2 kaj 3 al Lunteren, tiam vi havos ĉiujn necesajn tekstojn.

Kun ĝojo ni povas anonci ke ĉe 'estraraj elektoj-punkto 7.2.1.' ni aldonas novan nomon. Sinjoro Marc van Oostendorp pretas fariĝi prezidanto.

Se Marc van Oostendorp kaj Peter van Noorden estos akceptataj kiel novaj estraranoj, ni bezonas anstataŭantojn por la arbitracia komisiono (punkto 7.1) kaj por la kaskontrola komisiono (punkto 7.3). La lunĉo estas senpaga por ĉiuj kiuj ĉeestas la jarkunvenon. **Bonvolu anonci vian partoprenon** al la sekretario.

Post la kunveno kaj la posttagmeza programo vi povos partopreni al **vespera manĝo** (en la ejo Floor). La prezo por tiu ĉi manĝo inkluzive 2 trinkaĵojn estas €22,50. Bonvolu anonci vin ankaŭ por tiu ĉi manĝo kaj antaŭpaga la sumon al la kasisto de Esperanto Nederland.

**Atentu:** anoncu vin ĉe la sekretario (sekretario@esperanto-nederland.nl) se vi ĉeestos la jarkunvenon kaj lunĉon, kaj ankaŭ anoncu vin por la



vespera manĝo kaj samtempe pagu por tiu vespera manĝo. Tiamaniere la Floor-estro scios kiom da homoj partoprenos.

**Posttagmeza programo:** Leston Buell prezentos Artan Atelieron: Simplaj floroj. Detalan priskribon vi trovos post tiu ĉi artikolo.



### Etaj stratlibrejoj

Libroj por etaj stratlibrejoj (<https://minibieb.nl/>). En la libroservo ĉe UEA restas stoko de libroj de Esperanto Nederland, ili estas komisivendataj por ni. Pro la foriro de la libroservo el Roterdamo ni reprenas tiujn librojn. Ni decidis donaci ilin al la membroj kaj al la partoprenantoj de studosemajnfinoj. Parton de la libroj ni proponos meti en etajn stratlibrejojn. La unuaj saketoj estis disdonataj en la marta studosemajnfino. Pliajn ni disdonos dum la jarkunveno.

**La venonta estrarkunsido** okazos la 21-an de Aprilo.

Groningen, la 2-an de Aprilo 2022

Ineke Emmelkamp, sekretario  
sekretario@esperanto-nederland.nl



## Bonvenon!

Estas ĝojige fari tiun ĉi rubrikon! Ĉi-foje estas kvar novaj membroj.


Denove amsterdamano aliĝis: Leston Buell. Eble vi jam konatiĝis kun li dum la kunvenoj de La Amsterdama Rondo.

Aliaj du novaj membroj estas Mariska de Jonge el Almere kaj Ron Winteraeken el Gronsveld. Ambaŭ partoprenis la studosemajnfino en Marto kaj tie ambaŭ ricevis la gramatikan libron de Roel Haveman kaj Arjen-Sjoerd de Vries. Kaj la kvara nova membro estas Jan Nouwen el Dieren. Mi esperas konatiĝi kun li dum la jarkunveno, la kultura tago aŭ en la oktobra studsemajnfino.

Dit artikeltje is een van de leukste om te maken! Opnieuw is een Amsterdammer lid geworden: Leston Buell. Misschien ken je hem van de bijeenkomsten van de Amsterdama Rondo.

Twee nieuwe leden zijn Mariska de Jonge uit Almere en Ron Winteraeken uit Gronsveld. Beiden hebben deelgenomen aan het studieweekend in maart. Ze hebben daar al een grammaticaboek van Roel Haveman en Arjen-Sjoerd de Vries gekregen! En de vierde nieuwe aanmelding is van Jan Nouwen uit Dieren. Het zou leuk zijn om met hem kennis te maken tijdens de ledenvergadering, de culturele dag of in het studieweekend in oktober!

Ineke Emmelkamp,  
Sekretario Esperanto Nederland  
sekretario@esperanto-nederland.nl



### Over het boek:

"Esperanto, Grammatica met Oefeningen"

ISBN: 9789062831449

Prijs bij [Bol.com](http://Bol.com): € 64,90


Prijs bij [UEA](http://UEA): € 30,00

Voor nieuwe leden gratis.



## Arta Ateliero: Simplaj Floroj

prezentos Leston Buell  
21-an de Majo 2022  
dum la jarkunveno de  
Esperanto Nederland



Jam dum kelkaj jaroj, Leston Buell, usonano loĝanta en Amsterdamo, faras desegnojn precipe uzante nigran inkon kaj akvofarbajn kraĵonojn. Inter liaj desegnaĵoj estas veraj personaj, karikaturaj kaj bestaj personaĵoj kaj floroj. Jen kelkaj el liaj lastatempaj desegnaĵoj.

Dum la jarkunveno de Esperanto Nederland, Leston gvidos artan atelieron por maksimume 20 personoj. Vi ne nepre devas havi sperton pri desegnado aŭ kolorigado por partopreni. Dum la ateliero, vi faros belan, multkoloran poŝtkarton kun simpla desegno de floroj sekvante tri-etapan metodon: Unue, ni skizos diversformajn florojn kaj foliojn per grafito kraĵono, poste ni preparos finan desegnon per inka skribilo kaj finfine kolorigos la desegnon uzante akvofarbajn kraĵonojn. Tiu kraĵonoj similas al la plej ĝenerale konataj koloraj kraĵonoj, sed ilia kerno konsistas el akvofarbo. Por aktivigi (solvi) tiujn farbojn, ni uzos skribilforman penikon, kiu enhavas propran akvujeton. La prezentanto provizos vin per ĉiuj necesaj materialoj, kaj ĉiu partoprenanto kreos finitan verkon. Jen du ekzemploj de la tipo de kartoj kiujn ni produktos dum la ateliero.



## Esperanto-tulipoj

Hodiaŭmatene mi trovis tutpaĝan foton en Het Parool de nia Esperanto-tulipo. Vidu la kunmetaĵon. Mi skanis ĝin tiel ke vi verŝajne povos rekompili la tutaĵon, se vi eventuale volos publikigi ĝin. Sed vi certe povos ankaŭ trovi la foton en la cifereca eldono de la ĵurnalo. Okulfrape ke oni publikigas ĝin ĝuste nun dum la aktuala militbruo.

Kees Ruig

Sur la paĝo:

"Maandag 28 februari 2022 - Beeldend kunstenaar Espeth Diederix heeft een bloementuin: *The Miracle Garden* in het Erasmuspark. Wekelijks fotografeert ze in haar tuin en beschrijft ze wat ze ziet. Vierjaargetijden - Tulipa Esperanto [...] Wanneer ze nét opkomen en je de vorm van de uiteindelijk plant net niet herkent, krijg je merkwaardige abstracte sculpturen. En bij elke ontdekking ben je toch weer verrast dat er iets opkomt. Onvoorstelbaar, omdat er maandenlang niets te zien was, al die tijd zat het onder de grond. Dit is een viridiflora-tulp, de *Tulipa Esperanto*. Er komt een rozerode bloem aan met een groene vlam. Het blad begint met een roze rand."



© DigiShots (DigiShots)

## Het paard Esperanto overleden

*Uit: Website Hoefslag van woensdag 30 mrt 2022*  
Esperanto van Andrea John overleden  
Het 21-jarige internationaal Grand Prix-paard Esperanto is overleden, zo meldt de nieuws site Eurodressage. Hij genoot vanaf 2020 van zijn pensioen. Vorige week brak hij in de paddock zijn heup. Aangezien de ruïn veel pijn had, is besloten om hem in te laten slapen.

**EK:** De Rhapsodie-nakomeling begon zijn carrière als springpaard. Onder de Duitser Harald Lill. Als vijfjarige liep hij in 2006 in de A en L klasse. In 2007 nam de Oostenrijkse Andrea John de teugels over. In 2010 maakte de combinatie hun Grand Prix-debuut, waarna (inter)nationale successen volgden. Zo kwamen ze onder andere in 2013 voor Oostenrijk aan de start op het EK in Herning en werden ze individueel 33ste.

## KER-ekzamenon RETE en Junio-Julio

UEA anoncas tri ekzamenperiodojn por la jaro 2022:

- En Junio-Julio estos eblo rete trapasi ekzamenojn, tio signifas ke ĉiu el sia propra hejmo povos ekzameniĝi;
- En Aŭgusto dum la Universala Kongreso estos paperaj, ĉeestaj ekzamenoj; kaj
- Fine de Novembro en la malnovaj formoj, kadre de la Tutmonda Ekzamentago, ni organizos ĉeestajn sesiojn, dise en la mondo.

Por ekscii la intereson de la esperantistaro rilate al la rete trapaseblaj junio/julia ekzamenoj la Ekzamena Komisiono de UEA lanĉis enketon. Ni petas ĉiujn, kiuj interesiĝas pri la ebloj ekzameniĝi rete en tiu periodo, ke ili bonvolu plenigi tiun enketilon.

Legu pli ĉe la paĝo: <https://edukado.net/novajhoj?id=869>



## Alvokoj al legantoj

Ĉu estas nur mi kiu pensas ke Esperanto, la revuo de UEA pli kaj pli mallegebliĝas? Tiu penso trafluis mian grizan ĉelaron kiam mi eklegis la artikolon 'Kio estas progreso por UEA' de Duncan Charters, la Prezidanto de UEA, en la januara eldono. Kiu vere finlegas artikolon en kiu estas menciitaj pli ol 90 atentigeroj? lam mi lernis en kurso pri entreprena komunikado ke oni neniam menciui pli ol 4 atentigerojn kune; pli da ili la cerbo ne povas memori. El Flandrio mi ricevis la rimarkon ke la sola bonaĵo de Esperanto estas ke ĝi aperas regule kaj ĝustatempe. Kion vi opinias? Laŭ mi Esperanto ne havas redakcian konsilantaron, almenaŭ ĝi ne estas trovebla en la jarlibro aŭ en la revuo mem. Do tie mi ne povis demeti mian ovon. Kompreneble mi skribis al la redakcio. Post memoriga mesaĝo mi ricevis la konsilon skribi al la prezidanto de UEA. Tion mi faris, sed la respondo evidente estas ĉiam ankoraŭ dumvoje. Mi perdis la kuraĝon kaj neniam antaŭe tiom rapide finlegis la revuon 😊. Tial mi demandas al vi: 1) Ĉu mia opinio estas tiom stranga? 2) Kio estas via opinio pri Esperanto? 3) Ĉu vi trovas Esperanton interesa? 4) La aŭtoro mencias en sia artikolo preskaŭ 100 erojn. Ĉu ili estis utilaj al vi (kaj ĉu vi povas ankoraŭ memori eĉ unu el ili)? 5) Kia devus esti la revuo laŭ vi?



Por juĝi ĉu la revuo plenumas la dezirojn de la legantaro, mi esperas ricevi kiom eble plej multajn reagojn. Persone, sed kun via apogo, mi volas klopodi elvoki reagon pri la enhavo de la estraro kaj redakcio. La nomo de la revuo ja estas Esperanto kaj ne Esperinto 😊. Kiom bele estus, se mi povus legi la revuon sen disspručado de mia griza ĉelaro. Komparu kun Fenikso; ĝi ja estas belega sukceso!

Kees Ruig (volonte atendas vian reagon: k.ruig@telfort.nl)

## Rectificatie

In het voorwoord van het vorige nummer schreef ik "Het kantoor van de UEA vertrekt uit Nederland." Dat is echter onjuist. Het gebouw waar nu het centraal kantoor is gehuisvest, wordt verkocht. Het centraal kantoor blijft echter in Rotterdam en verhuist naar de benedenverdieping van het vier-etage-tellende gebouw Nieuwe Binnenweg 430. Dit gebouw is in bezit van UEA en is bekend als het vrijwilligershuis (Volontula Domo). De nieuwe plek biedt ruimte aan enkele werkplekken, die ze deelt met TEJO. De ruimte heeft het hoogste energielabel, A. Zie het document Plej Oftaj Demandoj (POD): <https://mallonge.net/pod> en ook <https://mallonge.net/kom1898>

Dank aan de lezers die mij hierop wezen.

In het POD staat ook geschreven: "Estas neniu intenco aŭ plano, ke UEA foriru Roterdaman, do Nederlandon. Male, estas planoj fortigi la agadon de UEA en la lando, kunlabore kun la landa asocio Esperanto Nederland kaj aliaj lokaj esperantistaj iniciatoj."

Foppe-Klaas Hovinga, hoofdredacteur

## Lingva testeto

Tiu ĉi testeto konsistas el du demandoj. Ĉu vi scias la ĝustajn respondojn?

- 1) En kiu parto de la domo oni kutime uzas peplomon?
  - a. En la kuirejo
  - b. En la banĉambro kaj necesejo
  - c. En la dormoĉambro
- 2) Kompletigu jenajn zamenhofajn proverbojn:
  - a. Ĉie estas varme, sed hejme plej ...
  - b. Bona estas Romo, sed tro malproksima de nia ...
  - c. Komenco bona, laboro ...

Vi povas trovi la respondojn al la testo sur paĝo 27.

Arjen-Sjoerd de Vries



## Paco inter homoj kaj nacioj

Gazetaraj Komunikoj de UEA n-ro 1023, de 2022-02-27


**El la deklaro de UEA al la esperantistoj kaj la mondo, reage al la militaj tondroj kaj homa sufero en la oriento de Eŭropo.**

Nun niaj modernaj komunikiloj havas la potencon unuigi la tutan mondon por individue kaj kolektive kriptesti uzadon de perforto kontraŭ senkulpaĵ kunhomoj, niaj gefratoj. [..]

**“Ni ne ĉesu labori por paco inter homoj kaj nacioj”**

La iniciatinto de Esperanto, D-ro L. L. Zamenhof kunligis siajn pacajn idealojn kun lingvo, kiu ebligas respektaman egalecon en la komunikado cele al reciproka interkompreniĝo inter la homoj. Vera bazo por tiu maturiĝo, kiu kondukus al definitiva forlaso de la deziro superregi aŭ suferigi niajn planedajn kunloĝantojn. En 1906, okaze de la 2-a Universala Kongreso de Esperanto, en Ĝenevo, li deklaris:

**“Nun, kiam en diversaj lokoj de la mondo la batalado inter la gentoj fariĝis tiel kruela, ni, Esperantistoj, devas labori pli energie ol iam”.**



Nia tasko estas klara. Komenci en nia propra konscio elradikigi antaŭjuĝojn kaj malamon al konatoj kaj nekonatoj. Poste kunlabori kun ĉiuj bonkoraj individuoj, kiuj dediĉas sin al edukado por interhoma kompreniĝo. [...]

Ni [...] nature kaj senlace esprimas nian solidarecon kun ĉiuj samideanoj, kiuj suferas pro perfortaj atencoj kontraŭ iliaj rajtoj al paca, sekura vivo.

### Konkrete helpo

Se vi volas helpi en la nuna situacio, vi povas donaci je **la konto Espero ĉe UEA** (<https://uea.org/alighoj/donacoj/espero>). Ĝi estis fondita okaze de alia kruela milito en Eŭropo por interalie iom helpi al familioj de esperantistaj viktimoj, kaj UEA uzos tiun kaj aliajn rimedojn por montri sian solidarecon kun iliaj kuraĝaj familianoj

## Kajto rememorigas pri Fukuŝima

**La 11-an de marto 2022 pasis 11 jaroj post la Granda Katastrofo kaj la nuklea akcidento en Fukuŝima, Japanio.**

La intereso pri la nuklea akcidento fariĝas pli kaj pli malgranda en la mondo, kie okazadas diversaj aferoj sinsekve. Tamen la akcidento ankoraŭ ne finiĝis. La detruitaj reaktoroj staradas. Oni ne scias, kiaj estas la fandiĝintaj nukleaĵoj, nek scias, kiel oni povos elpreni ilin, nek scias, kiel oni povos sekure teni la centralon. Ĉiun tagon ekestas 150 tunoj da radioaktiva akvo.



Jam konservita estas kvantego da poluita akvo, kiun la kompanio kaj la registaro decidis forĵeti en la maron post du jaroj.

La muzikgrupo Kageboushi (Esperante: Silueto) poemverkis, komponis kaj komencis kanti kanton en 2013. Hana-ŭa sakedomo verkis Esperantan version de ĉi tiu kanto, “Hejme floras certe, sed...” Ĝi temas pri la dezertigitaj urboj, kie same kiel antaŭe floras bele diversaj floroj, kiujn neniu povas ĝui. La kanto estas kantata de Kajto. <https://mallonge.net/223fuk>



## Pri la 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56) Ĉiuj esperantistoj estas invititaj.

**Litova Esperanto-Asocio afable invitas vin partopreni la ĉiujarajn internaciajn somerajn tradiciajn 56-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-56). La aranĝo estas dediĉata al la 770-jariĝo de Klaipėda.**

**Dato: la 9-17-an de Julio, 2022.**

La partoprenantoj de BET-56 havos luksajn kondiĉojn por laboro kaj ripozo. Ili povos libere kaj senlimige uzi la tutan infrastrukturon kaj servojn de la universitato.

### **Kotizoj**

Aliĝkotizo: 80 eŭroj por okcidentanoj kaj egaluloj (ekskl. loĝado kaj manĝado).

### **Loĝado**

En studenta domo de la universitato: unulitaj ĉambroj 35 eŭroj tagnokte) kaj dultitaj ĉambroj (30 eŭroj tagnokte por unu lito)

En studenta domo de la universitato (unu lito tagnokte 20 eŭroj)

### **Manĝado**

En la universitata kafejo *Jogundė*. unutaga prezo 10 eŭroj (3 eŭroj matenmanĝo kaj 7 eŭroj tagmanĝo).

### **Pli da informoj**

Fenikso 6/2021, paĝo 11.

Por pli da informoj kaj por registriĝi iru al <https://sezonoj.ru/2021/08/bet-99/>.



Lastsomere mi estis en la Esperanto-urbo Herzberg am Harz, kie mi renkontis du Esperantistojn el la baltaj ŝtatoj: estoninon kaj litovininon. Mi neniam sciis multe pri tiu landgrupo kaj ial supozis, ke ili 'simple' estas iuj el la slavaj landoj (verŝajne pro la ekssoveta historio). Estis naive, mi scias; tamen ĉiu informiĝo estas ĉiutage por iuj personoj tutnova. Min tiuj Esperantistoj amike korektis, ke la lingvoj fakte ne estas slavaj kaj eĉ kun malsimila origino unu kompare kun la alia.

Fortune tiuj baltŝtatoj informis min, ke sekvontsomere okazos tie denove BET; perfekta oportuno por mi nutri mian freŝvekitan intereson pri tiuj landoj. La vojaĝo tie plue estas bone farebla: aŭte al Kiel, Germanio, kaj plue per pramŝipo rekte al Klaipėda, Litovio, la BET-urbo ĉi-jare. Mi esperas, ke la evento povos senprobleme okazi kaj ke mi vidos tie ankaŭ iujn nederlandajn Esperantistojn!

*Joost Franssen*

## La korako kaj la vulpo

*Rakonto de Jean de La Fontaine  
Traduko: Anneke Schouten-Buys*

Majstro Korako, alte sur branĉo,  
tenis enbeke bonegan fromaĝon;  
Majstro Vulpo per odor' allogita,  
laŭdire ekamikiĝis tiele:  
"Bonan tagon, Senjoro Korako, saluton!  
Kiel bela vi estas, kiel mi vidas vin!  
Vere, se via voĉo pruvus  
kompariĝi al via pluma vesto  
vi estus la fenikso de ĉi tiu arbar'."

Ĉe tiu vorto la korako ĝojas,  
kaj por melodii sian kanton  
malfermegas la bekon, tiel ke la predo elglitas.  
La vulpo, kaptinte ĝin, diras: "Kara,  
lernu de mi ke tiu kiu montras flatadon  
vivas koste de tiuj kiuj lin kredas.  
La leciono valoras fromaĝon, mi pensas."  
La korako, honteme kaj silente pentante,  
ĵuris – iom malfrue – ke plu neniu lin trompos.



# Adiaŭ, Nieuwe Binnenweg

*Prenita el Libera Folio de la 5-an de Marto 2022*

**En la prestiĝa nederlanda ĵurnalo NRC sur videbla loko aperis artikolo de Marc van Oostendorp pri la vendo de la domo de UEA en Roterdamo. La nederlandlingva artikolo havis la Esperantan titolon "Adiaŭ, Nieuwe Binnenweg", kaj finiĝis per la vorto "adiaŭ" en Esperanto. Kun permeso de la aŭtoro ni publikigas la tutan tekston en Esperanto.**

*La Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo fermiĝas. Marc van Oostendorp rememoras pri sia forta ligo kun inventita lingvo en la praktiko.*

Dum sesdek ses jaroj ekzistis en Nederlando montrofenestro kie sensuspektaj preterpasantoj povis vidi ekzemplerojn de Reĝo Lear de William Shakespeare, de La taglibro de Anne Frank aŭ de Asterikso la Gaŭlo. Baldaŭ tio finiĝos. Definitive falis la kurteno por la centra oficejo de Universala Esperanto Asocio (UEA) en Nieuwe Binnenweg en Roterdamo.

Ekde sia fondo en 1908, UEA estis la plej granda Esperanto-organizaĵo en la mondo, kun la celo antaŭenigi la internacian lingvon proponitan en 1887 de la pola okulkuracisto Lejzer Zamenhof. La oficejo estis establita en Roterdamo en 1955, post sidejoj en Ĝenevo kaj Londono.

**Ĉe sia apogeo, Nieuwe Binnenweg** estis la fieraĵo de la movado: oficejo kie homoj el plej diversaj landoj kunlaboris Esperantlingve, unu el la malmultaj lokoj kie eblis atentigi kolegon en Esperanto ke la necesejo denove ŝtopiĝis. Ĝi estis la loko kie oni redaktis la vaste legatan monatan revuon Esperanto, organizis la internaciajn kongresojn, kaj kie do troviĝis ankaŭ librovendejeto, krom granda biblioteko.

Mi estis tie ofta vizitanto. Kiel juna knabo, enamiĝinta al la strebo plibeligi la mondon pere de lingvo. Kiel studento, pensanta ke eblas ekscii plej multe pri lingvo tie kie inventita lingvo estas uzata en la praktiko. Kiel mezaĝa viro fleganta rilaton de amomalamo kun la foje mirigaj idealistoj de la movado, sed neniam malliganta sin de tiu. Mi paŝis en la oficĉambron de la severa finna direktoro, vidis ludi la filinon de la hungara revu-redaktoro, sidis ĉe la



kaftablo kaj ridis kun la bosniano Simo, la kroato Nikola, la rumano Ionel, la nederlanda Atie. Eĉ ne estas evidente ke nun ekzistus malpli da Esperanto-parolantoj ol pasintece. Aplikaĵoj kiel Duolingo logis centmilojn da homoj al la ideo lerni la lingvon. Nur ke tiuj homoj ne plu sentas sin allogataj al membreco en iu asocio. Krome la konstruaĵo iĝas ĉiam pli multekosta – ekzemple, necesus signifa investo por plenumi la postulojn de la energi-normoj –, kaj ankaŭ la laborkostoj en Nederlando iĝas tro altaj por internacia asocio.

Plej multaj laborantoj estis jam maldungitaj aŭ proksimiĝas al pensiiĝo. La libroservo iros supozeble al klubo de bone organizitaj slovakoj, la biblioteko kaj la arkivo al la Nacia Biblioteko de Aŭstrio, kiu jam hejmgigas Esperanto-muzeon. Jure la asocio tamen ja restas en Roterdamo.

La Esperanto-movado jam 135 jarojn batalas por demokratia formo de internacieco. Ĉu por tio ĝi elektis la ĝustan formon, pri tio eblas diskuti. Sed nun, kiam la Komitato – la plej alta demokratia organo de la asocio – decidis forlasi Roterdamon, venas fino al unu aparta formo de idealismo en la urbo. Adiaŭ.

*Marc van Oostendorp  
Tradukis István Ertl*



## Vivo kiel denaskulo

**Dum la jarkunveno de Esperanto Nederland Silvia Pilger rakontis pri sia viva kiel denaskulo en Esperanta familio en Nederlando. Jen la dua parto de ŝia rakonto.**

Silvia: 'Kompreneble aliaj homoj pensis, ke tio estas tro multe por tia malgranda infaneto, tiom da lingvoj en tiu malgranda kapo.' 'Mia patro multe laŭtlegis al mi libretojn. Estis nederlandaj libroj, sed li tuj tradukis en Esperanton, do kompreneble li legis tion. La literoj estis en la nederlanda, sed la rakonto estis en Esperanto. Kaj multaj libretoj estis senditaj al mi. Mi memoras belegajn pakajojn el Ĉinio kun multaj ĉinaj libroj.'

Silvia: 'Mi devas rakonti ankaŭ ke miaj gepatroj ne nur parolis al mi en Esperanto kaj la pola, sed ili ankaŭ laŭtlegis librojn en la rusa kaj en la dana, la franca. Mi aŭdis multajn lingvojn hejme.'

Do tiu ekstera mondo ne estis tiom certa, ĉu tio estas bona. Silvia: 'Mi memoras multajn demandojn. Ankaŭ kiam mi estis pli aĝa, homoj ofte demandis al mi: "Ĉu tiu Esperanto estas religia sekto?" Mi veturis al tiuj kongresoj. "Kio tio estas? Kion ili tie faras?" Multaj demandoj, kaj ankaŭ: "Tio ne estas vera lingvo." "Ĉu vi povas koleri en Esperanto?" - Mi vere povis koleri al miaj gepatroj, kiam mi estis adoleskanto, mi kompreneble ne ŝatis miajn gepatrojn kaj mi povis ferebati pordojn, kaj krii al miaj gepatroj kaj poste pli normale. Kaj mi certe havis malbelajn vortojn en Esperanto por uzi. Do jes, Esperanto por mi estis normala lingvo, kiel ĉiu ajn lingvo.'

'Kiam mi estis adoleskanto, mi tiom malŝatis, ke miaj gepatroj parolas al mi en diversaj lingvoj, kiam ĉeestas aliaj homoj. Do mi ofte demandis "Ĉu vi ne povas normale paroli nederlande al mi?" en tiu periodo de mia vivo. Mi estas nun tre feliĉa, ke ili ne aŭskultis min, sed



Infankongreso Budapeŝto



IJK Krakovio 1987

ili daŭrigis per tiuj lingvoj kaj post iom da tempo mi tion denove ankaŭ ŝatis.'

'Kiam mi estis dekse-jaraĝa mi veturis por la unua fojo al junulara kongreso. Mi ofte veturis al kongresoj kaj vizitis infankongresojn. Tio estis tiom plaĉa; estis ĉiam multaj infanoj el la tuta mondo. Mi ludis, mi parolis, mi rakontis pri mia vivo. Mi ekskursis, estis ĉiam ege bonaj semajnoj.'

'Mi estis en Hungario ankaŭ en infankongreseto en Budapeŝto. Tie mi amikiĝis kun knabino el GDR, Germana Demokratia Respubliko. Mi volis scii, ĉu ŝi rigardas iun televidprogramon, kiun mi tre ŝatis rigardi, kaj ŝi diris: "Ne, ĉar ni ne povas, ĉar ni ne havas televidon kiun vi havas." Kaj tiam ŝi pli kaj pli rakontis pri ŝia vivo malantaŭ la Muro Germana. Kiam mi revenis en la lernejo, mi ankaŭ rakontis al miaj geamikoj kion mi spertis kaj kion mi aŭdis de tiuj infanoj. Koreoj, Irananoj, homoj venis el la tuta mondo. Ankaŭ estis tiom plaĉaj la konversacioj inter ni kiel esperantistaj infanoj.'

'Mi ŝatis demandi unu la alian: "Kiom da lingvoj vi konas?" Mi kun miaj tri lingvoj estis en Lelystad speciala infano, ĉar mi parolis tri lingvojn, sed en tiu Esperanto-infankongresa mondo tute ne. Estis infanoj, kiuj parolis ses lingvojn aŭ eĉ pli en sia familio, do povis esti ankoraŭ pli nekutime. Sed por mi ne estis problemo. Ni parolis pri tio, kaj post tiam ni denove ludadis, kaj estis tute normalaj infanoj.'

> La tria kaj lasta parto de la prelego sekvos en la venonta numero de Fenikso.



## Studieweekend maart 2022


In het weekend 25, 26 en 27 maart was er een studieweekend. Op verschillende niveaus werd er les gegeven. De nadruk lag op het oefenen van het spreken in Esperanto in kleine groepen. Het studieweekend vond plaats in het Natuurvriendenhuis Krikkenhaar in Bornebroek. Enkele aanwezigen vertellen hier hoe zij het studieweekend hebben ervaren.

### Ni ekparolu Esperanton!

*Heleen van de Reep en Thijs van Viegen.*

Een paar jaar geleden begon het als een grapje tussen Thijs en mij (zijn moeder). We zochten een geheimtaal. Een taal die alleen wij zouden spreken en begrijpen en die toch een echte taal was. Het werd Esperanto. We vonden boekjes om het te leren, websites die ons hielpen. En we kregen er steeds meer plezier in. Maar alleen maar met elkaar praten is ook zo beperkt. Misschien moeten we toch andere mensen zoeken die ook Esperanto leren? En zo vonden we het studieweekende.

We kwamen wat later aan op vrijdagavond. In de zaal zaten mensen aan verschillende tafels; jong en ouder, man en vrouw. Aan de meeste tafels deden ze een spelletje: vortludo. Thijs zag een bekende van een *kunveno* in Rotterdam en sloot zich bij de jongeren aan. Ik zag een tafel waar geen spel gespeeld werd en ging daar zitten. Een tikkeltje overmoedig; het bleek de tafel van de docenten te zijn. In mijn beste Esperanto antwoordde ik op de belangstellende vragen. We waren welkom!



*Foto van Heleen van de Reep en Thijs van Viegen*

Op zaterdag begonnen de lessen. We zaten in groep 3. Een bont gezelschap van negen mensen van heel jong (elf jaar) tot in de zeventig met verschillende al gevolgde beginnerscursussen achter de rug. In onze groep lag de nadruk vooral op spreken. En dat hebben we gedaan! Onder de



*Foto van Lode Van de Velde*

rustige, geduldige leiding van docent Bert de Wit werden we daartoe uitgedaagd. In iedere groep zitten introverte en extroverte mensen. De een durft meer dan de ander, maar ieder kreeg gelegenheid om te spreken en vragen te stellen. Een goede docent weet ook uit te leggen. Niet te veel tegelijk, maar passend bij de situatie. Bert deed dat heel goed op zijn white board. We hebben ook veel plezier gehad met het spel: Wie ben ik? Door vragen te stellen moest je raden of je een ding, dier of mens was. Bert had als verborgen identiteit Winnie de Poe gekregen en dat was niet echt gemakkelijk te raden. Maar het meeste hebben we toch geleerd door het vragenspel (zie foto). We leerden nieuwe woorden, vragen stellen én we leerden elkaar ook nog eens beter kennen. En dat alles ook op het terras in het zonnetje. We zijn gebruid thuisgekomen.

In de vrije tijd werd er ook goed voor ons gezorgd. We aten verantwoord en lekker. Er waren drankjes en zoutjes in de avond. Het was gezellig. Ik wil iedereen die dit weekeinde zo goed voorbereid heeft, van harte bedanken. De organisatoren, de kookstaf en iedereen die voor of achter de schermen geholpen heeft. Estis mojose.

Op zondag vertrokken we moe en voldaan met een lifter naar huis. In de auto hebben we de hele lange rit Esperanto gesproken. Dat we dat durfden, danken we aan dit studieweekende.



# Hoe leg je dat uit?

Mariska de Jonge

Ik ben ongeveer een maand of 6 serieus bezig met het leren van Esperanto op diverse manieren. Halverwege februari heb ik bedacht dat ik voldoende kennis had van de taal om me aan te melden voor het studieweekend in maart. Mijn passieve woordenschat was voldoende om iets van een verhaal of discussie te begrijpen. Ingedeeld in groep 3, van docent Bert,



Instruisto Bert de Wit

bleek dat ook zo te zijn. In deze groep hebben we eigenlijk alleen spelletjes gespeeld en was veel praten nodig. Leuke spelletjes en een gezellige groep mensen. We hebben ook veel gelachen! Spelletje "wie/wat ben ik?" Bert wist als laatste welke naam er

op zijn voorhoofd geplakt zat. Hij heeft zo'n beetje alle fantasie-/knuffelberen genoemd die er zijn, voordat Winnie de Poeh uiteindelijk werd geraden.

Hoe leg je uit dat er een zeester in een tv-serie zit? Dan zeg je mar-stelo (leuk bedacht, vond ik) en helder voor iedereen, maar zo'n dier heet dus gewoon een asterio (bedankt woordenboek). Ik vond het lastig dat mijn actieve woordenschat dan nog maar klein is. En ik zit te veel in mijn hoofd en probeer ook direct alle geleerde grammatica toe te passen. Dat lukt wel aardig, als ik (te) lang nadenk.

Dat werkt natuurlijk niet in een gesprek. Hier moet dus nog aan geschaafd worden: ik heb me alvast aangemeld voor het studieweekend in oktober.

Koffie- en theemomenten tussen de lessen door: gezellig!

Avond-eten: alle complimenten voor de koks, erg lekker! Spelletjes in de avonden: ontzettend leuk en voor mij heel leerzaam.

Belangrijkste van alles: wat een aardige, gezellige, vriendelijke mensen heb ik ontmoet!

Leukste woord dat ik heb geleerd: ruldomo!

Ik hoop veel van jullie in oktober weer te ontmoeten.

# Het poortje naar het Esperanto ging "open"

Monique

## Vooraf

Rond de zomervakantie van 2021 kwam ik bij toeval (weer) in contact met Esperanto door een "Esperantosleutel". Deze werd bij een natuurvriendenhuus in Brabant "gevonden" door mijn dochter. Na ruim dertig jaar is de cirkel weer rond. In het verleden had ik zelf een Esperantoboekje bestudeerd. Daar er niemand anders in mijn omgeving was om te converseren bloedde mijn eerste poging dood. Bij een telefonisch gesprek met Ineke Emmelkamp voelde ik meteen een "klik". Ik gaf me op voor het studieweekend in november 2021. In maart 2022 kon na twee jaar onderbreking door "tante Corrie" het studieweekend weer doorgaan.

## Vrijdag 25 maart

Rond 15 uur werd ik door Emil en Ron opgehaald. Zij kwamen echt uit het diepe zuiden. Nu nog slechts honderdzeventig kilometer naar Almelo. Goedgemutst



gingen we op stap. Iets voor zessen arriveerden we bij het natuurvriendenhuus. Gelukkig waren we op tijd voor de gezamenlijke maaltijd. Daarna kwam aan "mijn" tafel de Esperantoscrabble boven water. Al mijn "Zoom"-cursusmaatjes deden mee. Bert had ons om de twee weken via "Zoom" les gegeven. Dit



omdat het weekend in november niet door kon gaan. Gelukkig speelden we voor de gezelligheid en niet voor de winst; sommigen speelden regelmatig Vortludo op de mobiel of tablet en waren erg goed.

### Zaterdag 26 maart

Rond half tien begon ik in groep twee bij Françoise. Tijdens de cursus mochten we alleen Esperanto gebruiken. Dat viel niet mee. Françoise begon met de basiswoorden: boven, onder enzovoorts. Fijn om alles nog eens door een docent uitgelegd te krijgen. Françoise herhaalde de uitspraak met engelengeduld. Alleen in het Esperanto mogen spreken viel vies tegen. Ik wou te snel. Pas laat in de middag viel het kwartje. Bij een speelse oefening waarbij we een afbeelding moesten beschrijven voelde ik in mijn hoofd een knop omgaan: het poortje naar het Esperanto ging "open". Na de les na het avondeten nam ik de tijd om in de gezamenlijke zaal mijn aantekeningen uit te werken. Anderen speelden Esperanto-Triviant of andere spellen. Het was gezellig. Omdat de klok een uur vooruit zou gaan (zomertijd) ging ik rond elf uur wintertijd moe maar voldaan slapen.

### Zondag 27 maart

Zomertijd. De klok was een uur vooruit gegaan. Dat viel even tegen. Toch weer verder. Op ons verzoek oefende Françoise nogmaals de uitspraak met ons. Na de lunch sloten we af met een spelletje. Eenieder kreeg een kaartje op de rug met naam van een plant, dier of bekend persoon. Door het stellen van alleen ja-of-nee-vragen moest ik er achter komen wie ik was. Na enige vragen bleek ik een haai te zijn. Na de koffie nam iedereen afscheid en rond 15.30 uur reden we weer richting het diepe zuiden. Gelukkig waren toch nog redelijk vlug op onze bestemming.

Moe maar voldaan kwam ik thuis.

Ik kijk met veel plezier terug op dit weekend. Ik heb veel leuke, bijzondere mensen leren kennen. Wat ze allen gemeenschappelijk hebben: de gastvrije houding, de openheid van geest en de wil om op hun geheel eigen wijze de wereld een betere plek voor al wat leeft te maken.

*Ĝis revido!*

## Geduldige docenten en vriendelijke medestudenten

*Ron Winteraeken*

Als student aan de Vertaalacademie ben ik dagelijks met mijn passie bezig: taal. Ook het Esperanto heeft al een lange tijd mijn aandacht. In de eerste plaats omdat ik het een prachtige taal vind, maar ook vanwege de fascinerende geschiedenis en het initiële idee, dat mij erg aanspreekt.

Twee keer eerder heb ik me opgegeven voor het studieweekend en telkens gooide corona roet in het eten. Gelukkig ging het deze keer wel door en ik keek er dan ook erg naar uit. De basis van het Esperanto heb ik geleerd met een cursusboek en met Duolingo, maar ik had nog nooit eerder met anderen de taal gesproken. Het was dan ook best wel spannend om het geleerde in de praktijk te brengen. Tijdens de lessen heb ik veel nieuwe woorden en uitdrukkingen geleerd. Aan het einde van het weekend dacht ik al zelfs in het Esperanto.

Niet alleen vanwege het zonnige lenteweer, maar vooral ook de geduldige docenten, de vriendelijke medestudenten en de gezellige sfeer, was het een onvergetelijk weekend. Ook niet te vergeten was de voortreffelijke organisatie. Na het weekend ben ik lid



geworden van Esperanto Nederland en ik verheug me al op de volgende samenkomst. Het weekend heeft me geïnspireerd om verder met het Esperanto bezig te zijn en nauwlettend houd ik ik Eventa Servo in de gaten om te zien wat er verder allemaal te doen is. Het lijkt me ook interessant om een internationaal congres te bezoeken en weer nieuwe mensen met dezelfde passie te leren kennen.



## Peter van Noorden    Marc van Oostendorp



Ongeveer 30 jaar geleden nam ik op de NOT te Utrecht bij een informatietafel van FLE informatiemateriaal over Esperanto mee naar huis.

Het gedachtegoed van het Esperanto sprak mij zo aan, dat ik mijzelf, te beginnen met *La Komencanto*, de taal leerde en begon aan de studie voor de LO-akte. De theoretische studie lukte aardig, maar het spreken, in het begin uitsluitend tegen jezelf, heeft tot op heden problemen gegeven. De akte kwam er niet. Wel had ik op een middelbare school te Purmerend meerdere Esperanto groepjes in het kader van de naschoolse activiteiten. Inmiddels was ik toegetreden als penningmeester tot het bestuur van FLE. Met Loes Demmendaal heb ik de vereniging Esperanto Nederland voorbereid, die Ko Hammer en ik bij een notaris in Purmerend van start hebben doen gaan.

Hoewel Esperanto in later jaren nog meer lezen, dan praten werd en door andere activiteiten in diverse verenigingen, op de achtergrond raakte, is de basisgedachte al die tijd niet verflauwd.

Het krimpen van de vereniging en de kans van opheffing, doordat er geen mensen zijn om een bestuur te vormen, heeft mij doen besluiten om mij opnieuw voor het bestuur beschikbaar te stellen. Ook al ben ik actief in nog 3 andere besturen, hoop ik waar mogelijk mijn bijdrage opnieuw te leveren.

*Peter van Noorden*

Antaŭ iom da tempo mi parolis kun ĵurnalisto kiu faras dokumentan filmon pri Esperanto. Al li tre plaĉis la idealoj de Lejzer Zamenhof, sed li ankaŭ opiniis, ke la projekto "fiaskis".

Kiam fiaskas idealo? Ne ekzistas ekzemploj kun kiuj kompari. Idealoj ofte povas daŭre inspiri homojn dum multaj jarcentoj ankaŭ se ili neniam plene realiĝas. La specifa estonta mondo, kiun Zamenhof havis en menso, ne ekzistos, ĉar ĝi estis antaŭ ĉio idealigita versio de lia propra deknaŭa-jarcenta mondo.

Mi diris al la ĵurnalisto: "Eble ne ekzistas ŝanco por idealoj kiel tiuj de la Esperanto-movado. Sed se tiel estas, la mondo estas perdita." Se homoj ne lernas paroli unu kun la alia egale, kiel homo kun homo, – kaj mi konsideras tion la kerno de la esperantista idealo – ni neniam povas solvi la grandajn problemojn de la homaro: militon, pandemiojn kaj klimatsanĝon. Mi neniam tiel klare esprimis tiun penson eĉ al mi mem. Sed se estas tiel, mi devas eklabori. La problemoj estas tiel grandaj, ke la homoj bezonas tuj ekparoli unu kun la alia, sur bazo de radikala egaleco, en lingvo de egaleco. Do mi decidis reaktiviĝi por la movado.

Mi lernis Esperanton antaŭ kvardek jaroj pere de la Praktika Kurso de Esperanto de Bert de Wit. La lingvo estas parto de mia vivo ekde tiam – foje aktiva, foje malpli aktiva. Antaŭ tridek jaroj mi verkis mian universitatan tezon pri ĝi. Antaŭ proksimume dudek jaroj mi estis la unua profesoro pri Interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo dum kelkaj jaroj. Krom en Esperanto Nederland, mi membras en UEA kaj en la Akademio de Esperanto. Antaŭ proksimume 20 jaroj mi jam estis en la estraro de Esperanto Nederland, prezidata de Hans Bakker, kiun mi ĉiam admiregis. Nuntempe mi estas profesoro pri la nederlanda kaj pri akademinivela komunikado ĉe la Universitato Radboud en Nimego. Mi regule verkas artikolojn por i.a. la revuo *Onze Taal* kaj por la ĉiutaga gazeto *NRC*. Mi vivas en Bilthoven kun mia edzino kaj nia 8-jara filino.

Esperanto ne estas perfekta lingvo. La idealo de Zamenhof ne estas perfekta idealo. Perfekteco ne ekzistas. Sed ili estas sufiĉe proksimaj al tio, kion la homaro nun bezonas.

Mi esperas, ke mi povas helpi al Esperanto Nederlando fari kontribuon, kiom ajn malgrandan, al la disvastigo de tiu ideo. Mi volas uzi tion, kion mi scias pri komunikado, pri lingvo, pri organizado. Ni estas malgranda asocio, niaj fortoj estas limigitaj, sed ni faru kion ni povas. Tial mi kandidatiĝis por la prezidanteco de nia asocio.

*Marc*



*Fotistino: Saskia Aukema*



## Rajtigilo

Membro povas reprezenti maksimume du aliajn membrojn dum la jarkunveno, se tiu transdonis subskribitajn mandatojn al la registranto ĉe la komenco de la kunveno.

## Financaj dokumentoj

En la sekvaj paĝoj estas financaj raportoj, kiujn ni pritraktos dum la venonta jarkunveno de Esperanto Nederland la 21-an de Majo 2022. Dum la jarkunveno en 2021 ni ne pritraktis la bilancon de 2020. Tial ni publikigas ĝin ĉi-sube. La aliaj informoj por la jarkunveno estas publikigitaj en Fenikso n-ro 2, paĝoj 16 ĝis 21.

## Bilancio 2020

<b>Bilancio Esperanto Nederland 31-12-2020</b>				
<b>Aktivoj</b>			<b>Pasivoj</b>	
Antaŭpagitaj kostoj	1.107,80		Kapitalo je 1-1-2020	96.997,02
ASN Konto	102.375,91		Deficito	2.650,49
Triodos kuranta	1.404,07		Kapitalo je 31-12-2020	94.346,53
Triodos rendement	522,37		Kreditoroj	30,80
UEA konto	-51,32		Kotizoj 2021	387,50
			Studsemajnfino 2021	75,00
			Katedro Amsterdam 2019-2023	10.354,00
			(Subvencio) membreco UEA	165,00
<b>Sumo de la aktivoj</b>	<b>105.358,83</b>			<b>105.358,83</b>
<b>Katedro Amsterdam 2019 - 2023</b>			<b>Sume</b>	
Enspezoj 2017	6.176			
Enspezoj 2018	4.594			
Enspezoj 2019	4.454			
Enspezoj 2020	4.654			
Elspezoj 2019		-4.762		
Elspezoj 2020		-4.762		
	<b>19.878</b>	<b>-9.524</b>	<b>10.354</b>	
<b>En 2020 donacis:</b>				
Ans Bakker - ten Hagen				
Loes Demmendaal				
Hans Erasmus				
Johan van der Hoek				
Tanja Huis				
Miny Massar				
Rob Moerbeek				
Melanie Mueller				
Baukje Muizelaar				
BW				



# Bilancio 2021

<b>Bilancio Esperanto Nederland 31-12-2021</b>				
<b>Aktivoj</b>			<b>Pasivoj</b>	
Antaŭpagitaj kostoj	2.457,60		Kapitalo je 1-1-2021	94.346,53
ASN Konto	99.375,94		Kresko de la kaptitalo	3.436,25
Triodos kuranta	11.943,01		Kapitalo je 31-12-2021	97.782,78
Triodos rendement	0,00		Kreditoroj	3.774,51
UEA konto	-23,37		Kotizoj 2022	492,50
			Studsemajnfino 2022	456,94
			Katedro Amsterdam 2019-2023	10.846,00
			(Subvencio) membreco UEA	151,40
			Donaco Baris por LAR	249,05
<b>Sumo de la aktivoj</b>	<b>113.753,18</b>			<b>113.753,18</b>
<b>Katedro Amsterdam 2019 - 2023</b>			<b>Sume</b>	
Enspezoj 2017	6.176			
Enspezoj 2018	4.594			
Enspezoj 2019	4.454			
Enspezoj 2020	4.654			
Enspezoj 2021	5.254			
Elspezoj 2019		-4.762		
Elspezoj 2020		-4.762		
Elspezoj 2021		-4.762		
	<b>25.132</b>	<b>-14.286</b>	<b>10.846</b>	
<b>En 2021 donacis:</b>				
Ans Bakker - ten Hagen				
Loes Demmendaal				
Marjet Erasmus				
Gerard Gerritse				
Benata Hengstmengel				
Johan van de Hoek				
Tanja Huis				
Miny Massar				
Rob Moerbeek				
Melanie Mueller				
Baukje Muizelaar				
Inge van der Stadt				
BW				



# Rezulto 2021

No.	Rezulto 2021			
Enspezoj:				
		<b>Realigita 2020</b>	<b>Buĝeto 2021</b>	<b>Realigita 2021</b>
1.1	Rentumo	29	0	0
1.2	Kotizoj	4.445	6.000	7210
1.3	Donacoj	2.849	750	3019
1.4	Legaco	0	5.000	5000
1.5	Aliaj enspezoj (komisiaj vendoj ktp)	35	20	14
	<b>Sumoj enspezoj:</b>	<b>7.358</b>	<b>11.770</b>	<b>15.243</b>
Elspezoj:				
1.6	Bankkostoj	212	220	216
2.1	Estraraj kostoj	783	1.200	619
2.2	Reprezentado	0	100	93
2.3	Membrokunveno	0	900	734
2.4	Kostoj membroadministrado	177	180	151
2.5	Arkivo IISG	1.000	1.000	1000
2.6	Biblioteko UVA	0	100	97
3	Verloren van Themaatpremio	0	250	0
4	Informado	82	2.300	847
5.1	Katedro UvA	3.000	3.000	3000
5.2	Studsemajnfino saldo	608	200	35
6	Fenikso	3.525	3.500	4499
7	Retejo Esperanto Nederland	116	130	116
8.1	UEA (Aligitaj membroj)	184	200	195
8.2	KomitatanoA de UEA	0	1.000	0
9.1	EEU Kotizoj	203	206	206
9.2	Reprezentanto ĉe EEU	0	0	0
11	Mabesoone-Regionaj agadoj	118	350	0
13.1	Junularo	0	200	0
14.1	Landaj renkontiĝoj	0	1.000	0
15	Ne-atenditaj aferoj + div. elspezoj	0	200	0
	<b>Sumoj elspezoj:</b>	<b>10.008</b>	<b>16.236</b>	<b>11.808</b>
	<b>Deficito</b>	<b>-2.650</b>	<b>-4.466</b>	

Klarigoj	
1.3	Malfondo de la Nimega klubo kaj kelkaj grandaj donacoj
2.1	Okazis nur zoomkunvenoj kaj unu fizika kunveno de la dekunuopo
3	Ne venis proponoj por pri juĝo
4	Preskostoj por Ontdek het Esperanto kaj Esperanto zo op zak! , telefonkostoj kaj afranko
5.2	Ne okazis studsmajnfinoj en 2021
6	6 ekzemplerojn, el kiuj 5 kun 28 paĝoj
8.2	Ni ne havis komitatanon A en 2021
9.2	Okazis nur zoomkunveno
11	La kostoj por LAR estas pagitaj el speciala donaco por LAR de Wim Baris
14.1	Ne okazis en 2021



# Buĝeto/Laborplano 2023

No.	Buĝet/Laborplano 2023			
Enspezoj:				
		<b>Realigita 2021</b>	<b>Akceptita Buĝeto 2022</b>	<b>Propono Buĝeto 2023</b>
1.1	Rentumo	0	0	0
1.2	Kotizoj	7210	5.800	5.800
1.3	Donacoj	3019	750	750
1.4	Legaco	5000	0	0
1.5	Aliaj enspezoj (komisiaj vendoj ktp)	14	20	10
	Sumoj enspezoj:	<b>15.243</b>	<b>6.570</b>	<b>6.560</b>
Elspezoj:				
1.6	Bankkostoj	216	220	220
2.1	Estraraj kostoj	619	1200	1200
2.2	Reprezentado	93	100	100
2.3	Membrokunveno	734	500	750
2.4	Kostoj membroadministrado	151	180	160
2.5	Arkivo (IISG)	1000	1.000	1.000
2.6	Biblioteko UVA	97	100	100
3	Verloren van Themaatpremio	0	250	250
4	Informado	847	2.300	2.300
5.1	Katedro UvA	3000	3.000	3.000
5.2	Studsemajnfino saldo	35	200	200
6	Fenikso	4499	3.500	3.500
7	Retejo Esperanto Nederland	116	130	130
8.1	UEA (Aligitaj membroj)	195	200	200
8.2	Komitatano-A (UEA)	0	1.000	1.000
9.1	EEU (Kotizoj)	206	0	0
9.2	Reprezentanto ĉe EEU	0	0	0
11	Mabesoone (Regionaj agadoj)	0	350	350
13.1	Junularo	0	200	200
14.1	Landaj renkontiĝoj	0	1000	1000
15	Ne-atenditaj aferoj + div. elspezoj	0	200	200
	Sumo de la elspezoj		<b>15.630</b>	<b>15.860</b>
	Deficito		<b>-9.060</b>	<b>-9.300</b>
	Kresko de la kapitalo	<b>3.436</b>		
<b>Klarigoj</b>				
2.3	Membrokunveno	Lunteren kostas iom pli pro la luĉo		
6	Fenikso	Fenikso havis 6 numerojn en 2021 el kiuj 5 ekzempleroj kun 28 paĝoj.		

## Oferto de (malnovaj) libroj

En mia koridoro nun denove staras kradokesto kun plej diversaj uzitaj libroj. Ĉu vi deziras ekkoni la japanan ludon GO? Ĉu vi deziras scii ion pri Bulgario? Ĉu pri la tertrema katastrofo en Japanio (2011)? Ĉu vi deziras kanti? Mi havas plurajn "Verdaj Trobadoroj". Aŭ ĉu poemoj estas via prefero?

Pri niaj libroj:

Ĉu vi deziras trarigardi la liston? Rigardu la retejon aŭ petu al mi la plej aktualan liston. Senpage kaj volonte mi sendos al vi la dezirata(j)n libro(j)n. Vi pagos nur la sendokostojn por la libroj.

*Ineke Emmelkamp,*

*sekretario@esperanto-nederland.nl*



Kalle Kniivilä

## LA MALAMIKO DE PUTIN

Aleksej Navalnij kaj liaj apogantoj



Mondial

La 20-an de aŭgusto Aleksej Navalnij devis morti. Tion rakontas unu el la murdistoj, kiam Navalnij mem telefonas al li post kelkaj monatoj. "Malfeliĉaj" cirkonstancoj kaŭzis, ke la nervoveneno metita en la blua boksista kalsono de Navalnij ne havis tempon efiki. La aviadilo urĝe surterigis kaj la ambulanc-kuracistoj savis lian vivon.

La provo de la sekurservo malaperigi Navalnij montras, ke li estas la ĉefa malamiko de Vladimir Putin. Sed kiu li vere estas? Kia estas lia fono? Kion li volas, kaj kiuj lin subtenas? Kaj antaŭ ĉio: kial li elektis reveni al Rusio – kie lia vivo, kiel li mem diras, ne valoras eĉ tri kopekojn.

\* \* \*

Ĉi tiu libro temas pri la nun plej konata politika malliberulo en la mondo, pri lia batalo kontraŭ la korupto en Rusio kaj lia tutlanda organizaĵo, kiu nun ne plu ekzistas, ĉar la rusiaj aŭtoritatoj trovis ĝin "ekstremisma".

MONDIAL • Novjorko



[www.esperantoliteraturo.com](http://www.esperantoliteraturo.com)



## Dineke Paetzel-Veenstra

26 oktobro 1934 – 24 marto 2022

En 1973 Dineke partoprenis Esperanto-kurson en Almelo. Ŝi ĝuis la lernadon, rapide progresis kaj korespondis kun esperantistoj en diversaj landoj. En 1975 ŝi fariĝis membro de Esperanto Nederland.

Post sia transloĝiĝo al Rijssen la kontaktoj kun la grupo en Almelo malpliĝis, sed ŝi restis fidela esperantistino. Ŝi forpasis la 24-an de Marto je la aĝo de 87 jaroj.

Ni kondolencas al ŝiaj infanoj kaj genepoj.

Inge de Bruin - Kooij



Foto: JanBee, <https://noordhorntoenenu.com/>

## Bessie (C.W.E.) Schadee

11 augustus 1943 – 6 april 2022

Bessie is lid geweest van Esperanto Nederland. Ze richtte onder meer het project Indigenous Dialogues Foundation (Fondaĵo Indiĝenaj Dialogoj) op, een internationaal project dat tot doel had organisaties van inheemse volkeren over de hele wereld in staat te stellen rechtstreeks, vrij en betaalbaar te communiceren.



## Klaus Leith

Ni aŭdis, ke nia aktiva samideano Klaus Leith el Kolonjo (Germiano) (post komplika operacio) mortis la 3-an de Aprilo 2022.

Klaus kreis diversajn varbilojn kaj disdonis ilin amase. Ekzemple, li kreis "Esperanto-gramatikon sur "Bierdeckel". En la nederlanda lingvo: bierviltjes. Li informis multajn politikistojn pri la celoj de Esperanto.



La eksterordinara sukcesa EU-varbkampanjo favore al Esperanto estis en la "aktivaj manoj" de Klaus. Senlace li laboregis dum la lastaj jaroj, por ke Esperanto atingu realajn sukcesojn.

Lia agado estas menciita en Fenikso n-ro 2/2022 paĝo 24. La 9-an de Januaro 2022 Klaus klarigis en La Amsterdama Rondo la tiaman situacion pri la proponoj pri Esperanto en la civitana konsultado.

Li parolis pri la bona rezulto de la proponoj rilate lingvoinstruadon kaj Esperanton.

Pro la subita morto de Klaus Leith, ni estas malgajaj kaj ni funebras. Niaj sinceraj kondolencoj al lia edzino kaj al ĉiuj kiuj havis amikajn rilatojn.

Ineke Emmelkamp,  
Nome de la membroj kaj estraro Esperanto Nederland



# Vortserĉenigmo

## La temo de la enigmo de ĉi tiu eldono estas Urboj.

Solvo de la lasta vortserĉenigmo estas:

**"Ĉu vi havas recepton por tiu bona frisa sukerpano?"**

La ĝusta solvo estis sendita de Mariska de Jonge.

*Sendu vian solvon al ni. Ni metos la nomojn de*

*tiuj, kiuj solvis la vortserĉenigmon en la*

*venontan numeron.*

Kreita de Frank van Hertrooij

P	A	R	O	O	O	G	R	U	B	M	A	H	O	
M	M	O	G	E	N	B	N	B	E	U	K	U	N	P
N	S	K	A	P	O	M	U	R	R	I	O	E	D	R
O	T	I	H	A	D	E	N	K	O	U	I	S	A	A
M	E	V	N	R	N	O	M	G	A	V	S	I	L	G
L	R	A	E	I	O	N	R	A	T	R	S	E	V	O
O	D	J	P	Z	L	U	O	E	D	T	E	K	L	O
H	A	K	O	O	B	N	B	O	A	R	I	S	N	O
K	M	J	K	S	I	E	I	N	O	E	I	E	T	R
O	O	E	A	L	L	C	B	P	V	K	T	D	E	O
T	N	R	R	G	E	U	O	O	A	A	S	L	O	V
S	T	E	R	N	L	O	V	K	S	O	M	N	A	R
S	B	A	E	O	F	L	O	R	E	N	C	O	I	S
O	D	V	V	B	A	R	C	E	L	O	N	O	I	M
O	O	M	O	R	B	U	D	A	P	E	Ŝ	T	O	O

Ik ben lid geworden van de vereniging en Koos is zo vriendelijk geweest om enkele nummers van Fenikso mee te sturen met het welkomstpakket.

Ook het nieuwste nummer met een woordzoeker.

Ik heb geen idee aan wie ik mijn oplossing moet mailen, maar ik heb de woordzoeker opgelost. Leuke puzzel! Amike, Mariska de Jonge

Frazo:

### Vortoj:

Amsterdamo	Florenco	Oslo
Ateno	Hamburgo	Parizo
Barcelono	Istanbulo	Prago
Belgrado	Kievo	Rejkjaviko
Berlino	Kopenhago	Romo
Berno	Londono	Stokholmo
Bruselo	Madrido	Strasburgo
Budapeŝto	Minsko	Venecio
Bukaresto	Moskvo	Vieno

Fotisto: Andries Hovinga





# Revuo-interŝanĝo

## Benata Hengstmengel-Koopmans

**Revuo-interŝanĝo de Benata Hengstmengel-Koopmans estas projekto por legi pliajn revuojn. Vi povas kontakti min pere de la retadreso [benata@zonnet.nl](mailto:benata@zonnet.nl).**

**Jura Semajno, februaro 2022: numero 6 (speciala numero), Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio, [www.esperantojuro.org](http://www.esperantojuro.org)**

La 1-an de Marto mi ricevis rete tiun ĉi bultenon kun "Deklaracio de Internacia Jurista Esperanto-Asocio okaze de la agreso de Rusio kontraŭ Ukrainio, **kondamnanta la ĵusan militagreson okazantan en Ukrainio**".

**Monato, 43-a jarkolekto, Februaro 2022/02 kaj Marto 2022/03, monata revuo en Esperanto, internacia magazino sendependa; eldonejo Vlaamse Esperantobond, [www.monato.be](http://www.monato.be)**

Februaro: En la rubriko **lingvo** mi trovis artikolon de A. Giridhar Rao, la korespondanto de Monato en Barato, pri Mahatmo Gandhi. Por mi tre interesa temo ĉar kiel (Gimnazia) studento mi kelkfoje en Esperantaj medioj prelegis pri Gandhi. En 2007 la Unuiĝintaj Nacioj deklaris lian naskiĝtagon (la 2-an de Oktobro): "internacia tago de senperforto" = lingva senperforto, rilate al la rajto ricevi edukadon en la gepatra lingvo.

Ĉe la rubriko **Arto** trafis min la nomo de la konata **Claude Nourmont**, kiu estis ties redaktoro de 2005-2022. Ŝi forpasis la 25-an de Februaro 2022 (laŭ Gazetara Komunikado de UEA). Marto: Sur la **kovrilpaĝo**: portreto de Aleksej Navalnij, artikoloj pri Kazaĥio, pri la spirito de Mosul (=Nineveh), pri Venezuelo kaj pri Meksiko

En la rubriko **leteroj**: Gerrit Berveling skribas leteron: "Kio estu la normo?", reago pri eseo de Valentin Melnikov (Monato 2021/10), kiu kontraŭas Nobel-premiitojn.

Cetere aperas anonco pri **en la retbutiko havebla libro** de Kalle Kniivilä, "Homoj de Putin", 1-a eldono 2014, 2-a ampleksigita eldono 2016, bindita aŭ kiel bitlibro havebla ĉe Flandra Esperanto-Ligo.

**La Revuo Orienta, 102-a jaro, numero 1192, Decembro 2021 – 12, eldono de Japana Esperanto-Instituto, papere ricevita.**

En la rubriko **Esperanto kaj Mi** aperas artikolo "Miaj spertoj" de Elisabeth Le Dru (ŝia Esperanta nomo: Elinjo, preskaŭ same kiel mia 5-jara nepino Elin).

En la rubriko **Scienco** aperas jena resumo: Artefarita intelekto disvolviĝis tiel alte, ke ĝi povas diagnozi ĉefajn malsanojn de la brusto.

En la **Libroteko Tokio**: "Taglibro de Anne Frank", Anne Frank. **N. Bartels** (1997); "Praavo kaj la kotokukoj", Sigrun Eldjarn. **Ragnar Baldursson** (1988).

**Sennaciulo, Novembro-Decembro 2021, oficiala organo de la Sennacieca Asocio Tutmonda, 2021-11.12, [www.satesperanto.org](http://www.satesperanto.org)**

**Frontpaĝo**: foto ĉe artikolo pri la Hokkajda Societo por la Laborista Sindikato Kannama

**SAT-anoj aktivas**: artikoloj politikaj, recenzoj, nekrologoj. Vizito al **presejo** Ulzama apud Pamplona kie oni presas la revuojn 'Sennaciulo' kaj 'Sennacieca Revuo'.

**Poemo** "Miaj amindaj eŭkaliptoj".

**Kontakto 2021:4, numero 304, <http://kontakto.tejo.org>**

La nova ĉefredaktoro de Kontakto estas Paweł Fischer-Kotowski.

La ĉefartikolo pritraktas Arnold Schwarzenegger kiel klimataktivulon (kun ties foto sur la kovrilpaĝo).

Aliaj temoj estas: Anonime (Konfeso de malliberulo); Sano (Ĉu la masko utilas?) kaj recenzo (de **Said Baluĉi** pri 'Sur bluaj planedoj' de Laure Patas d'Illiers).

Blogo de István Ertl: 'Tiel la mondo... protestas'.

Movada rubriko kun anonco ke la 78-a Internacia Junulara Kongreso de **TEJO** okazos **kune denove**: de la 20-a ĝis la 27-a de Aŭgusto 2022 en **'De Roerdomp', Westelbeers, NL!**

**Norvega Esperantisto, 3-a periodo 89-a (98-a) jaro, 1/2022, du-monata revuo (dulingva) de Norvega Esperantista Ligo, papere ricevita.**

Artikolo pri **'verda lineo inter Norvegio kaj Kongo'**.

La rubriko **'lingva pilolo'** pritraktas la u-formon.

Artikolo pri **'konstruitaj lingvoj'** - temas pri nova studfako en la Universitato de Tromsø.

**Dia Regno, numero 1 (952) – 2022, du-monata kristana revuo en Esperanto, ricevita papere kiel membro de KELI.**

Sur la kovrilpaĝo foto pri la **'Kandelfesto'**; je la 2-a de Februaro okazas en kelkaj eklezioj celebrado de la prezentado de Jesuo ĉe la Templo.

Leif Nordenstorm el Svedio raportas: **'La Sveda Eklezio petas pardonon de la sameoj (aŭ laponoj)'**.

Anonco ke la sekvonta **Kristana Kongreso okazos de 16-23 Julio 2022 en Domaszék, Hungario.**

El la libreto **'Preĝo por ĉiu Tago' de Jelly Koopmans-Schotanus** (mia patrino) aperas unu teksto; oni povas mendi la libreton ĉe Pavel Polnicky:

[polnickypavel@seznam.cz](mailto:polnickypavel@seznam.cz). Kun libervola donaco oni subtenas la agadon "Stichting Zienderogen", iniciata kiel "Evidente" de Jacques Tuinder (kies vidvino Vera forpasis la 27-an de Januaro; vidu Fenikson 2022-2).



## Kultura Tago

Sabato la 25-a de Junio 2022 en Woudrichem



Ĉi-jare ni finfine povas denove organizi kulturen tagon kaj renkontiĝi persone!

Tiu ĉi tago, organizata de kelkaj volontuloj de la asocio Esperanto Nederland, okazos en la pitoreska Woudrichem, kiu situas en la Land van Heusden en Altena.

Woudrichem estas malgranda fortikaĵa urbo en Nordbrabantio ĉe la rivero Merwede, kie Maas kaj Waal renkontiĝas. Sur la alia riverbordo estas Kastelo Loevestein.

Ĝi jam havas urborajtojn ekde 1365.

La poeto Simon Vinkenoog estis ĉi tie en 2006 kaj verkis poemon pri Woudrichem. La esperantistino Jorien, loĝanta ene de la fortikaĵoj de la urbo kaj unu el la organizaj teamanoj, tradukis la poemon. Jen la unuaj versoj:

"Kion urbo lernas de siaj rajtoj  
Batalo por libereco por ĉiu civitano."

La fortikaĵoj ankoraŭ restas preskaŭ tute nerompitaj. Vivante apud la akvo, la homoj kutimis vivteni sin ĉefe per fiŝkaptado. Kaj do vizito de la Muzeo pri Fiŝkaptado certe estas programero.

Same interesa estas promenado kun Esperanto-ĉiĉeronado, estas multaj aferoj spektindaj. Aŭ vi partoprenos en la solvado de enigma demando por ekkoni la urbeton. Tiu kiu preferas okupiĝi pri lingvo kaj poezio povas mem traduki poemojn sub gvido de Karina Scharff. Nia programo finiĝos per koncerto de la konata muzika duopo **Kajto**, kiu jam delonge kantas siajn proprajn kantojn en Esperanto. La grupo ĝuas grandan internacian famon.

La programo komenciĝos je 10.30 en lunĉokafejo "Gewoon Ploon" Hoogstraat 19 (akcepto kun kafo/teo kaj dolĉaĵo). Ĝi inkluzivas komunan lunĉon kaj finiĝos je 17.00.

- 10:30 - 11:00 **Akcepto** ĉe lunĉokafejo "Gewoon Ploon" kun kafo/teo kaj torto
- 11:15 - 13:00 **Promenadoj** tra Woudrichem aŭ **Traduki poemojn** en Esperanton sub gvido de Karina Scharff.
- 13:00 - 14:00 **Lunĉo** en "Gewoon Ploon"
- 14:00 - 15:00 Vizito de la **Muzeo pri Fiŝkaptado** kun ĉiĉeronado
- 15:00 - 15:30 **Koncerto** de la muzikgrupo **KAJTO**
- 15:30 - 16:00 **Paŭzo** kun kafo/teo en "Gewoon Ploon"
- 16:00 - 17:00 **Dua parto** de la **koncerto de KAJTO** en "Gewoon Ploon" kaj fino de la programo
- ekde 18:00 *uur* laŭvole komuna vespermanĝo je propra kosto (nepre aliĝu antaŭ la 10-a de Junio)

Poste eblos partopreni komunan vespermanĝon (fiŝan/viandan/vegetaran), prezo cirkaŭ € 25 (sen trinkaĵoj), pagendaj de vi mem surloke.

Pro necesa rezervado, nepre mendu antaŭe!



La kotizo por la tagprogramo kaj komuna lunĉo estas € 15,-.  
Ne-membroj pagas € 20,-.

Trans la akvo fakte estas la plej bona maniero por atingi la fortikaĵan urbon. La pramŝipo al Woudrichem foriras ĉiun horon de Veerhaven en Gorinchem (20 minutojn da piediro de la fervoja stacidomo aŭ 6 minutojn de la parkejo). Post bela dekkvin-minuta vojaĝo la pramo alvenas meze en la historia centro. De la ĝeto oni facile piede atingas la kunvenejon "Gewoon Ploon" en Hoogstraat 19 en nur kelkaj minutoj.

Aliaj publikaj transportiloj verŝajne pli rapide alportos vin al Woudrichem, i.a. per la rapidbusoj el Utreĥto aŭ Breda. Ni organizas nian propran pendolservon ekde la haltejo Transferium De Tol en Sleeuwijk (post antaŭmendo). Detalaj informoj pri alirebloj sekvos post aliĝo.

Per biciklo aŭ mopedo eblos belajn alvojaĝojn laŭ la digoj de Waal kaj Maas, inter alie tra Brakel kaj Andel.

Aŭte prenu la A27, elirejon 23, direkte al Sleeuwijk-Woudrichem.

Diversaj senpagaj parkejoj disponeblas.

La aliĝilo por tiu ĉi unika tago troviĝas en la retpaĝaro de Esperanto

Nederland: <https://esperanto-nederland.nl/> aŭ ĉe Smaranda:

**luminita.tintu@gmail.com**. Aliĝu kaj pagu plej laste la 10-an de junio.

Bonvolu ĝiri la sumon de €15 aŭ €20 en la konton NL 10 TRIO 0786 8441

67 de kasisto Esperanto Nederland, Capelle aan den IJssel menciante

"Kultura Tago Woudrichem".



Fotoj de Jorien Captein

## WOUDRICHEM

650 jaroj da urbaj rajtoj

Kion urbo lernas de siaj rajtoj  
Batali por libereco por ĉiu civitano  
En tempoj de paco kaj tempoj de  
malbono neniam estas tro malfrue  
por la rajto al libereco

...



# Benelux-congres

## Een ereplaats voor Esperanto in Ieper

**Neem deel aan het volgende Benelux-congres in “vredesstad” Ieper.**

De organisatie van een jaarlijks Benelux-congres is al enkele jaren weer een traditie. Na edities in Antwerpen, Lier en een aantal keer in Charleroi is het West-Vlaamse Ieper aan de beurt. **Van vrijdagavond 23 september tot zondagmiddag 25 september** organiseert de Vlaamse Esperantobond er het Benelux-congres.

Ieper is een stad met een groots verleden. In de Middeleeuwen kon Ieper qua bevolking en economie wedijveren met Brugge en Gent. Samen vormden zij het trio van belangrijke steden van het graafschap Vlaanderen. Het Ieperse “laken”, een geweven wollen stof, was tot ver buiten de grenzen befaamd. Na de teloorgang van de lakenindustrie verloor de stad zijn glans. Toch speelde Ieper, gelegen bij de grens van het toenmalige Franse koninkrijk, een belangrijke rol als vestingstad. Een belangrijk deel van de toenmalige vestingen is nog bewaard gebleven en omgevormd tot een park waar het aangenaam wandelen is. Maar wellicht het meest beroemd/berucht is Ieper vanwege zijn wedervaren tijdens de Eerste Wereldoorlog. De stad werd nagenoeg totaal verwoest. De “oude” gebouwen die je er nu ziet zijn allemaal reconstructies van wat er ooit stond. De imposante Menenpoort, een monument ter ere van de – voornamelijk – Britse soldaten die in en om Ieper het leven lieten, overheerst de stad. Meer dan honderd jaar na de Eerste Wereldoorlog wordt nog elke avond stipt om acht uur de Last Post geblazen. Niet zonder reden noemt de stad zich “vredesstad”.

Dit Benelux-congres is bijzonder omdat in hetzelfde weekend, met name op zaterdag 24 september een “vredes-evenement” plaatsvindt. Het evenement wordt georganiseerd door het solidariteitskoor Vamos pra Lutar samen met drie andere organisaties waaronder de Vlaamse Esperantobond. Het kadert in een wereldwijd korenfestival voor de vrede, georganiseerd door een groep organisaties die officiële relaties hebben met UNESCO, o.a. UEA. Het festival dat eerst in 2020 zou plaatsvinden om het Internationale Jaar van de Vrede in 2000 te herdenken werd uiteindelijk verschoven naar september 2022. 21 September is namelijk de



internationale dag van de vrede. Bedoeling is dat alle deelnemende koren (77 in totaal, uit alle hoeken van de wereld) rond die dag lokaal een evenement organiseren. Daarnaast is er een centraal vredesfestival in Tolosa (Spanje) waar vooraf opgenomen liederen van alle koren zullen worden geprojecteerd.

Het vredes-evenement in Ieper is de bijdrage van Vamos pra Lutar aan dit internationaal korenfestival voor de vrede. Op het programma staan natuurlijk een koorconcert van het zestigkoppige koor (met afsluitend lied onder de Menenpoort) maar daarnaast ook bijzondere nevenactiviteiten. Op de Grote Markt zullen vrijwilligers, zoals elk jaar rond die tijd, de gigantische vredesvlag (31 bij 58 m) openleggen. Bovendien is er ook voor Esperanto een bijzondere rol weggelegd want de Vlaamse Esperantobond krijgt de beschikking over het Vleeshuis, een prestigieus gebouw in het centrum van de stad, om de bevolking en deelnemers te informeren over Esperanto.

De organisatoren van het Benelux-congres hopen dan ook veel esperantisten uit binnen- en buitenland, bijv. uit Nederland, te verwelkomen. We krijgen een unieke kans om Esperanto te presenteren als levende “taal van de vriendschap”.

Noteer het weekend van 23 tot 25 september nu al in je agenda! Via Eventa Servo kan je je inschrijven voor het Benelux-congres of alleen voor het vredes-evenement.

*Piet Glorieux*



## Junaj esperantistoj ekde 1878 iĝos libro

*El Libera Folio de 21-an de Februaro*

La ŝanĝiĝantaj kulturoj, moroj, kaj agadoj de junaj esperantistoj dum diversaj epokoj estos en la centro de planata verko pri la historio de junulara movado. Estos esplorata interalie la junulara lingvaĵo tra la jaroj kaj la signifo de muziko en la movado. La libro aperos ankaŭ en aliaj lingvoj. [...] La fondaĵo Esperantic Studies Foundation subvencias kvar aktivulojn por verki novan libron pri la historio de la Esperanto-junularo ekde 1878 ĝis hodiaŭ. La libro laŭplane aperos en 2024 kaj pri la projekto kunlaboras ankaŭ UEA, TEJO kaj Esperanto-Asocio de Britio (EAB). [...] Ĝi ne estos seka historio de organizaĵoj, sed temos multe pli pri la ŝanĝiĝantaj kulturoj, moroj, kaj agadoj de junaj Esperantistoj.  
Pli da informo: <https://mallonge.net/223-liberafolio>

Respondoj de la

## Lingva testeto

Jen la respondoj de la lingva testeto de paĝo 7.

**Respondo de demando 1: c.**

*Peplomo* estas trastebita vata aŭ pluma litkovrilo (nederlande: *dekbed*). Antaŭ la uzo oni kovras ĝin per *tego* (*hoes*).

**Respondo de demando 2:**

- a. ĉarme;
- b. domo;
- c. duona

*Arjen-Sjoerd de Vries*


## Sankta Tito Brandsma

En la lasta numero de Fenikso ni jam menciis, ke Titus Brandsma estu enkanonigita. La 4-an de Marto 2022 en Vatikano papo Francisko prezidis la publikan ordinaran konsistorion por la proklamo de dekretoj por tri novaj sanktuloj. Inter ili estas beata Titus Brandsma, sacerdoto, karmelano, martiro. Titus Brandsma (Anno Sjoerd Brandsma) naskiĝis la 23-an de Februaro 1881 en Oegeklooster apud Bolsward kaj martire mortis la 26-an de Julio 1942 en la koncentrejo Dachau. Li estis frisa karmelana pastro, katolika sacerdoto, profesoro pri filozofio, ĵurnalisto, verkisto, tradukisto, kontraŭnaziulo kaj esperantisto. (Fonto IKUE, *Desegno de John Dons*)



## Oproep voor bijdragen

Elk lid van Esperanto Nederland houdt zich op zijn of haar eigen manier bezig met Esperanto, variërend van het bestuderen van de grammatica, het schrijven van gedichten of andere teksten, tot het ontmoeten van andere esperantisten, fysiek of op sociale media. We roepen je op om je ervaringen met ons te delen. Je verhalen zijn meer dan welkom, zowel in het Esperanto als in het Nederlands. Stuur ook foto's mee. Grammaticale fouten corrigeren we. Inkorten en andere aanpassingen doen we alleen in goed overleg. Wanneer je wilt, kunnen we ook een interview houden. Neem bij langere teksten eerst even contact met ons op.  
Stuur je bijdrage op naar: [redakcio@esperanto-nederland.nl](mailto:redakcio@esperanto-nederland.nl).



## Ekzistas diversaj radio-stacioj, kiuj elsendas en Esperanto

3ZZZ Radio  
Ĉina Radio Internacia  
Radio Frei  
Kernpunkto

Muzaiko  
Radio Havana Kubo  
Varsovia Vento  
Radio Vatikana

Diversmaniere vi povas aŭskulti elsendojn, ekzemple:  
- aŭskulti rete: <http://esperanto-radio.com>  
- aŭskulti per apo (nur Android): [Muzaiko](#)



Esperanto-radio  
**Muzaiko**





## 14 - 16 oktober 2022 Esperanto Studieweekend

**Voor wie** Als je nog nooit Esperanto hebt geleerd, of je Esperanto is nog niet zo goed als je zou willen, ben je van harte welkom. Er wordt op verschillende niveaus les gegeven. De nadruk ligt op het oefenen van het spreken in Esperanto in kleine groepen.

**Wanneer** Het studieweekend vindt plaats op vrijdag 14 t/m zondag 16 oktober 2022.

**Waar** Natuurvriendenhuis Krikkenhaar, Krikkenhaar 11, 7627 PA Bornerbroek.

**De kosten** voor dit studieweekend bedragen € 85,- p.p. (leden van Esperanto Nederland en NEJ of andere landelijke Esperanto-verenigingen betalen € 75,- p.p.) In de prijs zijn inbegrepen: lessen, het overige programma, overnachtingen, maaltijden, koffie en thee tussen de lessen door.

**Meer informatie** en het aanmeldingsformulier staan op de website van Esperanto Nederland: <https://esperanto-nederland.nl/ned/studieweekend/studieweekend.php>

## 78-a Internacia Junulara Kongreso, IJK

### La plej grava renkontiĝo por junaj esperantistoj

La 78-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos en De Roerdomp – Westelbeers, Nederlando, inter la 20-a kaj la 27-a de Aŭgusto 2022.

Ĝin organizos la Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ) sub gvidado de la Tutmonda Esperanto-Junulara Organizo (TEJO).

La temo de la kongreso estas Toleremo.  
Vidu: <https://ijk2022.tejo.org/>



Stratarto Zütphen

## Kultura Tago

### Sabato la 25an de Junio 2022 en Woudrichem.

Ĉi-jare ni finfine povas denove organizi kulturajn tagojn kaj renkontiĝi ĉeeste!

Tiu ĉi tago, organizata de kelkaj volontuloj de la asocio Esperanto Nederland, okazos en la pitoreska Woudrichem, kiu situas en la Land van Heusden en Altena.  
Por pli da informoj vidu [paĝon 24](#).



27a ĵarkolekto, n-r 3  
maĵo - junio 2022  
**Fenikso**

PostNL  
Port betaald  
Port payé  
Pays-Bas